Kvaronjara
# Bulteno
de la

Quarterly
# Bulletin
of the

## Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
## American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) (Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 176 ISSN: 0002-7499 aprilo 2008

## Enhavo

AAIE Matters
Koran dankon ... 1
Dumviva Membreco ... 1
Jarkunveno de AAIE en Montrealo ... 1
Financa Stato ... 2
Frua Historio de AAIE ... 2
Instru-sugestoj
"Earworms" ... 2
Eraroj kaj lernado ... 2
Kion Faras Bona Instruanto? ... 3
Kiun Lernolibron Vi Preferas? ... 3
Aliaj Sugestoj ... 3
ILEI Matters ... 4
Esperanto-Instruado Alilande ... 4
Working Together ... 4
Por Infanoj ... 4
Recommended Reading and Listening ... 5
Esperanto en la Reto
Lernu.net ... 5
Ĉu eblas televidaj Esperanto-kursoj en vivo pere de la reto? ... 6
Kalendaro ... 6
Pri Ekzamenoj ... 7
Want to Correspond ... 7
Esperanto-klasoj en Usono kaj Kanado ... 7
From and About Our Members ... 8
Announcements ... 8
Course Report Form ... 9
Membership Form ... 10

Redaktoro: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA <dorothyjean@gmail.com>

Formatisto: D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

AATE Matters

### Koran dankon al ĉiu kiu jam pagis kotizon por la jaro 2008!

Nur la jenaj AAIE-membro ankoraŭ ne pagis:

Aldrich, Bellant, Blum, Cardenas, Danhof, Du Temple, Estling, Grossman, Miller, Parks, kaj Stanton.

(Se estas eraro, bonvolu informi nian Korespondan Sekretariinon Sally Lawton ĉe 12 Stage Rd., Westhampton MA 01027; e-poŝte <Slaw-0@crocker.com>)

La kotizo por unu-jara membreco en AAIE-ILEI estas nun $40 por paperaj kopioj de la *Bulteno* kaj la *Internacia Pedagogia Revuo*, sed ankoraŭ $20 por ricevi ilin rete. Dumviva membreco nun kostas $800 kaj por elektronika sendado, $400 (20 x $20). Bonvolu uzi la formularon sur la lasta paĝo de ĉi tiu Bulteno kiam vi pagas.

### Dumviva Membreco

Jen la rezultoj de la voĉdonado pri dumviva membreco en AAIE:

a) *Ke oni ĉesu la eblecon nove aĉeti dumvivan membrecon:* 3 voĉdonoj por a)

b) *Ke dumviva membreco estu dudekoble la jar-kotizon, kaj ke oni konservu tiun enspezon en aparta konto:* 9 voĉdonoj por b)

Do, dumviva membreco en AAIE nun kostas $800 (20 x $40). Tri el niaj anoj (Duncan Charters, Ron Glossop, kaj Keneĉjo Goldbergo) profitis la ŝanĝon kaj iĝis dumvivaj membroj dum la kotizo estis nur $375.

### Jarkunveno de AAIE en Montrealo

Nia jarkunveno okazos en Montrealo iam inter la 11-a kaj 14-a de julio, 2008, kadre de la landa kongreso de Esperanto USA. Detaloj aperos en la junia numero de nia *Bulteno*. Dum nia jarkunveno ni faros la finan voĉdonon pri kandidatoj por Kasisto kaj Eduka Sekretario, ĉiu po dujara deĵoro. (Balotilo aperos en la junia *Bulteno*.) **We still need volunteers for the nominating committee** (kandidatiga komitato). Se vi konsentas helpi en tiu grava laboro, (or **if you would be willing to be a candidate for treasurer or education secretary)**, bonvolu kontakti nian prezidanton, Ron Glossop per e-poŝto (rglossop@mindspring.com), telefono ((314) 819-2303), aŭ ordinara poŝto (8894 Berkay Ave., Jennings MO 63136-5004). Antaŭdankon!

## Financa Stato

Nia kasisto Mary Napolitan raportas ke je la 7-a de aprilo, 2008,la banka saldo de AAIE estis $2,882.45.

## Frua Historio de AAIE

Jen iom da historio pri AAIE (el la arĥivoj de s-ino Doroteo Holland):

**1959**: George Falgier, instruisto ĉe elementa lernejo en St. Louis, MO, anoncis la fondon de la Usona Societo de la Esperantistaj Instruistoj (USEI) kiel oficiala sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj.

**Aprile 1959**: S-ro Falgier verkis "Informan Bultenon" kiu enhavis 7 paĝojn da adresoj (kiujn li prenis de 4 Esperanto-gazetoj) de Esperantistoj kiuj volas korespondi, kaj kiun li sendis al Usonaj Esperanstoj..

**Oktobre 1963**: La unua numero de la "USEI Bulteno" aperis. La redaktoro estis Ida Belle Craig el Sakramento, Kalifornio, kaj la enhavo raportis jar-kotizon de $2 kaj 5 Esperanto-klasojn por plenkreskuloj kaj 3 por infanoj, kun entute 40 lernantoj (informoj kolektitaj de Doroteo Holland);

**Februare 1964**: Laŭ numero 2 de la USEI Bulteno, "each member of USEI receives the official publications of both the national and international organizations" kaj la celoj de USEI estas:

"..to enable American teachers of Esperanto to cooperate in:

1) getting Esperanto into U.S. schools;
2) implementing the practical application of Esperanto by students and teachers through correspondence and personal visits;
3) exchanging information on all pedagogical matters."

**Oktobre 1964**: Doroteo Holland iĝis la redaktoro de la "USEI Bulteno". Tiu numero raportis ke estis tiam 52 membroj de USEI, kaj ke en Usono estis 37 Esperanto-klasoj kun entute 613 lernantoj.

**Julie 1969** ĉe la jarkunveno en North Adams, Mass., oni ŝanĝis la nomon de la oganizaĵo de "Usona Societo de Esperantistaj Instruistoj" al "Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto" por harmonii kun la nomoj de la Usonaj fremd-lingvaj membroj de la "American Council for the Teaching of Foreign Languages" (ACTFL).

# Instru-sugestoj

## "Earworms" As an Aid to Learning

by Gary Grady

An "earworm" is a catchy song, jingle, poem or the like that you hear somewhere and that keeps running through your mind, possibly driving you to distraction. Mark Twain wrote about one (without using that term) in an amusing short piece you can find on line by searching for the phrase "punch, brothers, punch."

Intentional earworms have been created for advertising and for education. Among the best known are the short "Schoolhouse Rock" cartoons broadcast on ABC from 1973 to 1985. (Thanks to Schoolhouse Rock I not only can recite the Preamble to the U.S. Constitution, I can sing it.)

A British company calling itself Earworms Learning (website earwormslearning.com) has adopted a similar idea as a way to teach languages. You can listen to samples on their website, but you may find it easier to go to the website of the recorded books company Audible (audible.com) and type "earworms" into the search box. Scroll down to a course of interest and click on the little triangle to the left of the word "sample" to hear to a sample lesson.

It's similar to many other recorded language courses in that it concentrates on teaching useful phrases. But it does several things to reduce the boredom of dry recitation, starting with the use of rhythmic background music. More importantly, it doesn't follow a monotonous pattern of saying every phrase in the foreign language twice with a pause in between. Sometimes the speaker says something several times in a row in time with the music, both to help you pick up on the pronunciation and to help fix the phrase in your memory.

It also makes use of two voices, usually one male (at times playing the role of a student) and one female (the teacher, a native speaker). Occasionally the "student" asks the "teacher" a question or suggests his own mnemonic for remembering a given word or phrase. (In the Japanese course he comes up with a particularly amusing way to remember the word for "beer."

The result strikes me as more pleasant and less boring than most language courses. My only complaint is that they only offer the bare beginnings of an introduction to each language. It would be nice to see something similar but more complete in Esperanto.

(A note to Audible customers: If you're considering buying an Earworms course, notice that with several of the courses Audible offers two volumes separately and also together as a unit. The latter is a much better deal. Also, as with most Audible offerings, it's cheaper to sign up for a subscription than to buy individual books.)

Something like this might be a good project for some AATE members with a gift for music.

## Eraroj kaj Lernado

de Gary Grady

Kiel ni ĉiuj scias pro la propra sperto, kiam oni komencas lerni novan lingvon, oni emas fari multajn erarojn.

En la pasinteco, ofta opinio en lingvoinstruado estis, ke gravas lerni ĝuste paroli ekde la komenco. Eraron oni devas tuj korekti, ĉar se la lernanto kutimiĝas fari erarojn, estos tre malfacile poste "mallerni" ilin kaj lerni la ĝustan elparolon, gramatikon, kaj vortuzadon.

Nu, sendube estas en tio iom da vero, sed efektive insisto pri perfekteco kreas siajn proprajn problemojn.

Unue, kelkaj komencantoj hezitas paroli la lernatan lingvon pro timo, ke ili faros erarojn kaj tiel ŝajnos malinteligentaj. La ĝeneco mem instigas ilin paroli -- kiam ili kuraĝas paroli -- des pli balbute kaj erare. Se la instruisto tuj korektas iliajn erarojn, tio plifortigas la timon.

Due, ĉar eraroj estas sufiĉe oftaj, aparte en la komenco, korekti erarojn emas malrapidigi la lernadon kaj eĉ enuigi la bonajn lernantojn.

Kaj ĉu vere necesas insisti pri frua perfekteco? Mi bone memoras, ke antaŭ multaj jaroj mi renkontis relative novbakitan parolanton de Esperanto kiu jam parolis tre klare, mirinde flue, kaj facile kompreneble -- sed samtempe gramatike eraregе, preskaŭ tute sen uzo de la akuzativo! Li kompreneble sciis pri la akuzativo kaj certe konstatis ke li parolas erare, sed li ne permesis tion malhelpi sian komunikadon. Kaj post nelonge, li laŭgrade enkondukis la akuzativon en sian paroladon. Baldaŭ poste li perfekte regis Esperanton.

Laŭ mia kompreno, la moderna lingvoinstruado nun taksas la kapablon komuniki multe pli grava ol la kapablon paroli senerare. Se oni ekzemple parolas denasksan lingvon kies substantivoj ne havas akuzativan formon, paroli sen la akuzativo ne signifas, ke oni mislernis la uzon de la akuzativo, sed simple ke oni ankoraŭ ne lernis ĝin.

Utilas konsili al la lernantoj, ke ili ne timu fari erarojn kaj ne ĝeniĝu pro neperfekta parolado. Aparte gravas eviti senĉesan sinkorektadon dum parolo, ĉar tiaj interrompoj malhelpas komunikadon kaj povas konfuzigi kaj ĝeni la aŭskultantojn.

Fakte Zamenhof mem foje konsilis, ke se oni havas denaskan lingvon (ekzemple la rusan) al kiu mankas la artikolo kaj pro tio ne tute komprenas kiel uzi la vorton "la" en Esperanto, oni simple ellasu ĝin en la komenco de la lernado.

Dirinte tion, mi klarigu, ke mi tute ne volas sugesti, ke la instruisto absolute neniam faru korekton, des malpli ke oni instruu al la lernantoj paroli erare! Kompreneble la fina celo devus esti perfekta rego de la lingvo. Kvankam por komencanto sukcesa komunikado pli gravas ol senerara parolado kaj skribado, tamen la instruisto ĉiam klopodu instrui la ĝustan uzon de la lingvo.

Do necesas atentigi la lernantojn pri eraroj. Fakte, estas konsilinde anticipi oftajn erarojn kaj averti la lernontojn pri ili eĉ antaŭ ol ili eraras. Tre gravaj ekzemploj estas la tiel nomataj "false friends". "Falsa amiko" estas vorto simila al vorto en la lingvo de la lernanto, sed kun alia signifo. La signifo povas esti tute malsama aŭ (eble eĉ pli konfuzige) nur subtile malsama. Jen kelkaj ekzemploj de oftaj eraroj de angleparolantoj lernantaj Esperanton:

"Akurata": ŝajne similas al la angla *accurate* ("precize ĝusta"), sed signifas *punctual* en la angla.

"Aktuala": ne la angla *actual* ("efektiva") sed *up to date*.

"Tipo": en Esperanto "io tipa", do en la angla *model*, *example*, aŭ *type* (en tiu malvasta senco). Kompreneble, la distingo estas subtila, kaj traduki la anglan vorton *type* kiel "tipo" ne estas grava eraro. Sed ofte la plej bona esperanta traduko de la angla *type* estas "speco".

"Po": Ĉar la esperanta vorto "po" ne havas ekvivalenton en la angla, kaj la angla vorto *per* ne havas ekvivalenton en Esperanto, kaj ambaŭ estas mallongaj prepozicioj kiuj komenciĝas per la litero *p*, estas neeviteble ke oni misligu ilin. Tial ni tre ofte aŭdas kaj legas ekzemple, ke iu aŭto rapidas je 100 "kilometroj po horo" aŭ ke hotelĉambro kostas 100 "dolarojn po nokto". Jen eraro kiu ja postulas korekton, ĉar eĉ tre kompetentaj parolantoj de Esperanto fojfoje misuzas ĉi tiun vorteton. Por klarigi la ĝustan uzon de "po" kaj kiel traduki la anglan "per" plej utilas ekzemploj:

*She drove (at) 100 km per hour* : Ŝi veturis (po) 100 kilometrojn hore.

*The hotel room costs $100 per night* : La hotelĉambro kostas 100 dolarojn nokte (aŭ por nokto aŭ por ĉiu nokto).

*I gave them two apples each* : Mi donis al ili po du pomoj.

Sur fakturo:
*5 bananas @ 25 cents* = 1.25 : 5 bananoj po 25 cendoj = 1.25

Ĝenerale, pli bone ol emfazi erarojn estas ekzercigi la lernantojn pri la ĝustaj vortoj kaj gramatikaĵoj. Se la lernantoj emas diri "Mi necesas ...", paroligu ilin per la frazeroj "Mi devas ..." kaj "Necesas, ke mi..." Se ili emas diri "Mi mankas (ion)", ripetu sufiĉe ofte "Al mi mankas (io)."

Kompreneble, mi priskribas ĉi tie mian propran opinion, kaj eble vi parte aŭ tute malsamopinias. Kiel vi plej sukcese traktas erarojn de viaj lernantoj? Kiajn erarojn ili emas fari? Mi ĝuus legi en ĉi tiuj paĝoj diskuton pri aliaj aliroj! [NdelR: Sendu ilin al la redaktorino!]

## Kion faras bona instruanto de Esperanto?

Doroteo Holland sugestas ke tiu:

…atentas la bezonojn kaj demandojn de ĉiu lernanto (ekzemple, kial ili volas lerni E-on? Kiel ili volas uzi ĝin?) kaj emfazas tion en la lecionoj. Se plaĉas al ili muziko, bona instruanto ludas Esperanto-kantojn kaj/aŭ kantigas tiajn lernantojn.

…uzas Esperanton en la klaso kiel eble plej multe, sed nur se la lernanto komprenas (helpas gestoj, bildoj, ktp)


…estas pacienca;

…kuraĝigas ĉiun lernanton aktive uzi Esperanton (paroli, aŭskulti, skribi), sed nur tion kion li/ŝi jam lernis.;

…ofte laŭdas ĉiun lernanton; kritikas kiel eble plej malofte kaj kun help-sugestoj.


## Kiun Lernolibron Vi Preferas?

respondas Gwenda Sutton (Novzelando):





I prefer "Saluton" by Audrey Childs Mee, which has many diagrams and is entirely in Esperanto. On every page are a few questions, and at the back in the Ŝlosilo or Key are the answers to the questions. Those using this book get into the habit of thinking in Esperanto, as they are not constantly translating Esperanto into English and vice versa, as in the traditional books.

There are also two wonderful new books *Poŝamiko* kaj *Esperanto by Direct Method*. *Poŝamiko* is pictorial and has pages of foods, drinks, colours, animals, furniture, etc. and explains Esperanto pronunciation and grammar very succinctly. Another similar book is *Ĵamborea Lingvo* which was written specially for scouts (skoltoj). It can be downloaded free.








*We invite you to tell us about your favorite textbook.*

## Aliaj Sugestoj

• **Don Houpe** raportas ke li insistas ke liaj lernantoj laŭt-legu en Esperanto preskaŭ ĉiun tagon. Li ofte uzas specialajn tekstojn, ekzemple Artamaj astronomoj de <edukado.net> kaj rakontoj el Esperanta literaturo.

• El ***JUNA AMIKO*** (Internacia Esperanto-Revuo de ILEI por lernejanoj kaj komencantoj)

Regulaj rubrikoj (ĉiu kun respondoj/solvoj sur apartaj paĝoj de la sama eldono):

- Lingva Doktoro (ekzemple, klarigo "Pri la difina arikolo la")
- Kontrolu vian lingvan scion (ekzemple "Divenu pri kiuj "sen…uloj" temas)
- Ludu per…. (ekzemple, "si-la-boj")
- Kvino Kvizo (Legu la rakonton kaj respondu la kvin kvizo-demandojn)

(Ekzemploj el la numero de decembro 2007)

# ILEI Matters

Every AATE member is automatically a member of ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). That means that part of your annual dues goes to ILEI each year and entitles you to receive their publication *Internacia Pedagogia Revuo*.

ILEI has developed two international Esperanto examinations (Elementa and Meza), both of which will be offered at the Esperanto conventions in Montreal some time between July 11 and July 14. (Dates and times are not yet available but will be announced in our June *Bulteno*.) These tests may also be taken at the Universala Esperanto-Kongreso in Rotterdam July 19-26 and at the ILEI-Konferenco in Porto-Novo, Benin, Africa, some time between July 29 and Aug. 5.

# Esperanto-Instruado Alilande

- A group of Esperanto students in Tehran, **Iran**, hosted several Esperantists from **Armenia** last December.
- Recently 49 students at the University in Brno, **Czech Republic**, completed a beginning Esperanto course, as did 9 at the university in Olomouc.
- At the high school in Pingrong, **Taiwan**, an Esperanto class of 24 students presented (in Esperanto and Chinese) to Esperantists from **China** a video program about the Hiroshima bombing and its consequences.
- At the Adam Mickiewicz University in Poznan, **Poland**, 18 students from 10 countries are studying Esperanto teaching methods and interlinguistics.
- Last February students from **Europe**, **Africa**, and **Asia** attended a class in Bydgoszcz, **Poland**, featuring the direct method of teaching Esperanto.
- Forty-five students attended an Esperanto course at ETS-Kmenge, the largest technical school in **Burundi** (Africa) last year.
- In **Hungary** there are close to 100 people teaching Esperanto.

# Working Together

Kelkfoje membro de AAIE sukcesis ricevi permeson fari ĉe la jar-kongreso de "**American Council on the Teaching of Foreign Languages**" (ACTFL) prezentadon pri Esperanto sub la kategorio "Less Commonly Taught Languages". Por tion fari, necesas

✓ Ke la prezentonto estu membro de ACTFL (temas pri pago de jar-kotizo)

✓ Ke oni sendu, longtempe antaŭe, detalan skribitan proponon (kutime en la angla).

Lastatempe la sidejo de ACTFL ŝanĝiĝis kaj nun estas ĉe 1001 N. Fairfax St., Suite 200, Alexandria, Virginia 22314. Pli da informo estas havebla ĉe <www.actfl.org>.

Ĉu vi rimarkis ke AAIE nun havas daŭran rubrikon en la novaĵ-letero de Esperanto-USA? Estras ĝin nia vic-prezidanto, D Gary Grady.

# Por Infanoj

La 39a **Internacia Infana Kongreseto** okazos de la 19a ĝis la 26a de Julio 2008 en Oostvoorne, Nederlando, 40 km oriente de Roterdamo. Granda junulara gastejo disponas pri 60 litoj, apude situas arbaro, kanalo kaj lago. Vidu detalojn kaj fotojn en la retejo <bertosch.free.fr/iik2008> aŭ skribu al Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

En la paĝaro de **Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo** <www.icxlm.org> estas libreto kiu havas unu kolorigeblan paĝon por ĉiu litero de la alfabeto: www.icxlm.org/abc. La vortoj estas: arbo, birdo, cirklo, ĉevalo, domo, elefanto, fiŝo, gitaro, ĝirafo, hundo, infano, jako, ĵipo, kato, libro, mano, nesto, ombrelo, pomo, roboto, stelo, ŝuo, tablo, urbo, vagono, zebro.

Estas ankaŭ kolora karto kun la alfabeto kaj alia karto kun 10 numeraloj: www.icxlm.org/abc/litero01.htm. Eblas presi la kartojn kaj tondi kartetojn por ĉiu litero aŭ numeralo. La vortoj estas: aŭto, balono, citrono, ĉevalo, domo, erinaco, flago, gitaro, ĝirafo, hundo, ĥameleono, insulo, jodo, ĵurnalo, kato, lupo, monto, najlo, ombrelo, pano, robo, skarabo, ŝipo, tondilo, urso, vulpo, zebro. (Vidu la sekvan paĝon.)

En ĉi tiu retejo estas kelkaj aliaj libretoj por infanoj, kaj ankaŭ por komencantoj. Kelkaj havas anglajn klarigojn aŭ hispanajn klarigojn, sed plejmulte ili estas en Esperanto, kun multaj desegnoj faritaj de infanoj.

(Artikolo de AAIE-ano Enrique Ellemberg, en *IPR* 08/1, paĝoj 30-31)

La literatura centro **Praatalo-instituto** en Finnlando denove okazigas fabelkonkurson por infanoj. Estas tri kategorioj: infanoj ĝis-8-jaraj, 9-10 jaraj kaj 11-13-jaraj.

La konkursaĵoj estu verkitaj originale, en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.


Oni sendu la konkursaĵojn poŝte kaj ili alvenu plej laste la 15-an de septembro 2008 ĉe la adreso: Praatalo-instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

La rezultojn oni publikigos la 18-an de oktobro, kiam finnoj festas la nomtagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu branĉo estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉefpremion "Fabelo Internacia".

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso, S-ino Aini Vaaraniemi, Vaarajarventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; rete: <aini.esp@pp.inet.fi>

Elstaraj fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, legeblas en: <www.taivalkoski.fi/paatalo-instituto/Esperanto.htm>




Tabeloj de la Esperanto-alfabeto kaj de numeraloj, ambaŭ kun bildoj, taŭgaj por instruado de infanoj, rete havebla en koloroj de la retejo de Infanoj Ĉirkaŭ la mondo: www.icxlm.org/abc/litero01.htm

## Recommended Reading and Listening

***Ĉu mi malplaĉis al vi?*** Marie-France Conde Rey. 20p. Kolorigebla libro. Kion fari kiam amikeco aŭ amo subite rompiĝas?

***Esperanto - mia akompananto***. Milan Sudec. 56p. Rememoroj "de simpla sed tamen nekutima esperantisto"
***Kubano***. Tutmondaj kantoj en Esperanto. Vol. 1. Kolektis Konisi Gasku. 86p. Tekstoj kaj muziknotoj por preskaŭ 60 kantoj.

***Stelo***j. Tutmondaj kantoj en Esperanto. Vol. 2. Kolektis Konisi Gaku 80+IVp. Tekstoj kaj muziknotoj por pli ol 50 kantoj.

***Fenestro***. Tutmondaj kantoj en Esperanto, vol. 3. Kolektis Konisi Gaku. 78+IVp. Tekstoj kaj muzik-notoj por pli ol 50 kantoj.

***Kubaj infanrakonto***j. Kolektis kaj trad. J. Campos Pacheco. 119p. Rakontoj, teatraĵetoj kaj legendoj el Kubo kaj cetera Latinameriko.

***Pronunciation for Beginners***. CD. Re-recording of an audiocassette made by Mike Sloper. Part I: Basic pronunciation; Part II: Readings from Richardson's *Learning and Using the International Language*. Includes complete text of part I. Esperanto-USA code: EUS001. $2.00.

***Nemave edifi*** de Stefan MacGill. Kvar teatraĵoj, prozaĵo; kaj poemo, kun ekzercoj, demandoj, kaj rolludoj por suplementi la legaĵojn por ke ili estu uzeblaj en kursoj aŭ por memstudo. Esperanto-USA kodo NEM002; $33.60 + sendo-kosto $2.75 . (Restas nur 3 ekzempleroj!)

NOTO: Ĵus aperies ĉe <edukado.net> respondoj por ties ekzercoj, kaj laŭscenaj resumoj de la teatraĵoj, por ke gvidantoj rapide akiru superrigardon de la prezentota materialo. Vidu www.edukado.net/pagina/Legejo/149#19606

## Esperanto en la Reto

### Lernu.net

In December 2002, www.lernu.net was launched. It is the web-page for learning Esperanto and becoming informed about the language. Its aim was, and still is, to help all web users in the world learn and begin to use Esperanto as easily and rapidly as possible, at no cost to the participant, and it is now available in more than 30 languages. It has more than 100,000 visitors every month, and more than 43,000 registered users.

In addition to Esperanto courses and purely instructional material, such as grammar, exercises, tests, and examinations, it offers a message system, picture cards, forums, a virtual classroom, instant message exchange, and a library with examples of original and translated literature, articles from 13 different magazines, texts concerning the history of the language and the movement; and collections of Esperanto music, films, jokes, and Zamenhof proverbs. Visitors can even see clips from the Esperanto-USA video course *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo*.

The content of the courses and tests is controlled by the Esperanto Academy, and one member of the Academy is a key member of the team that is continually working on improving the whole website.

The project is financed mainly by the ESF (Esperantic Studies Foundation), established by the late Cathy Schulze, who was an active AATE member for many years. (Translated from "lernu estas 5-jara!" in "Esperanto" februaro 2008, p. 31)

## Ĉu eblas televidaj Esperanto-kursoj en vivo pere de la reto?

de Gary Grady

Vi verŝajne konas YouTube kaj similajn retejojn, kiuj permesas al iu ajn fari filmeton kaj meti ĝin sur la reton por ke aliuloj povu spekti ĝin. La koston subvencias reklamoj, kaj nek la filmfarinto, nek la spektanto, devas pagi. Jam troviĝas tie kelkaj filmoj en kaj pri Esperanto. (Aparte notindaj estas kelkaj de la forpasinta Claude Piron; serĉu la nomon “Piron” por trovi ilin.)

Simila senpaga servo estas UStream.tv, sed ĝi permesas al vi ankaŭ dissendi televidprogramon “en vivo”.

Ĉar la spektantoj vidas la programon dum ĝi okazas, ili povas konversacii kun la programfaranto kaj inter si mem dum la dissendo per tekstaj mesaĝoj. (Kompreneble, ili povus ankaŭ telefoni.)

En aprilo mi spektis pere de UStream.tv parton de (ne-esperantista) kongreseto de Las Vegas, kaj post kelkaj semajnoj mi spektis alian programon kiun kungastigis du homo en Usono kaj alia en Britio, dum kio ili respondis tekstajn mesaĝojn diversaj spektantoj.

Esperantistoj povus simile uzi UStream.tv por dissendi kursojn programerojn de kongresoj, ktp.

Por spekti la programon necesas havi nur komputilon kun sufic`e rapidan retaliron. Vi povas facile provi per vizito al la retejo UStream.com. Por fari programon, necesas havi ankaŭ retkameraon (”web-cam”) aŭ videokameraon ligitan al via komputilo, kaj estas tre konsilinde have bonan mikrofonon (aŭ reta telefonkapaparaton (”headset”) kaj bone aranĝitajn lampojn por krei klaran bildon. La aldona kosto por la retkamerao kaj mikrofono povas esti multe malpli ol $100. Fakte, multaj komputiloj, aparte tekokomputiloj (”laptops”) nun havas retkameraojn. La aldona softvaro kiun vi bezonas estas senpage havebla de UStream.tv.

Aliaj senpagaj servoj estas Skype.com kaj ooVoo.com. Kiel vi verŝajne jam scias, Skype permesas al vi fari senpagajn telefonvokojn pere de la reto al aliaj Skype-uzantoj preskaŭ ĉie en la mondo. ĝi nun permesas al vi fari ankaŭ televidvokojn. Same kiel dissendanto en UStream.tv, necesas havi minimume retkameraon kaj prefereble “headset” kaj senpagan softvaron de Skype.

ooVoo.com tre similas al Skype, sed permesas al ĝis ses homoj televide konversacii samtempe. Do instruisto povus gastigi kurson por ĝis kvin stutandoj, kiuj povus partopreni de ties hejmoj, lernejoj, retkafejoj ktp kie ajn ili estas.

Skype kaj ooVoo povus esti utilaj ankaŭ en tradicia kurso. Eĉ sen vojaĝo, lernanto povas konversacii vid-al-vide kun iu en fora lando. Kompreneble, se la homoj tute ne konas unu la alian kaj ne perfekte regas la lingvon, unuafoja konversacio povas esti ne tute komforta. Sed estas kelkaj manieroj pliglatigi la aferon. Ekzemple, instruisto povas partopreni en la konversacio, kaj la partoprenantoj povus antaŭe ekkoni unu la alian pere de retpoŝto. Aŭ tuta klaso povus partopreni samtempe en unu aŭ ambaŭ flankoj.

Ĉu vi jam provis ion tian? Kia estas la sperto? Ĉu vi havas ideojn aŭ konsilojn? Bv skribi pri ili al la redaktorino!

---

AATE member Enrique Ellemberg has an excellent web page devoted to how to learn Esperanto: www.esperantofre.com/eeo/lern.htm.

---

# Kalendaro

**Junio 2008**

*30-18*: NASK (North American Summer Esperanto Institute) — U. of Calif., San Diego/ 3 levels, 3 weeks, 5 college credits). Instructors: Bertilo Wennergren, Birke Dockhorn, Lee Miller; course fees $1240 (waived for full-time students and teachers); Housing-single bedrooms, 3 meals a day $1260. Scholarships available. (Ellen Eddy eddyellen@aol.com and Esperanto.org/nask/)

**Julio 2008**

*11-14*: 56-a ELNA (Esperanto-USA) kongreso — Montrealo, Kanado (www.esperanto-usa.org; elna@esperanto-usa.org) Inkluzivos la jar-kunsidon de AAIE kaj Esperanto-ekzamenojn por anglalingvanoj.

*12-18*: 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto — Montrealo, Kanado (www.take7.ca; informo@take7.ca) Temo: Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: Diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj.

*19-26*: 23-a Universala Kongreso de Esperanto — Roterdamo, Nederlando. La 100-a jubileo de la fondiĝo de UEA. Temo: “Lingvoj: trezoro de la homaro”+

*19-26*: 39a Internacia Infana Kongreseto — Oostvoorne, Nederlando (40 km oriente de Roterdamo) — Vidu paĝon 4.

*29-05 aŭgusto*: 41a Konferenco de ILEI - Portonovo, Benino, Afriko (Atilio Orellana Rojas, atilioorellanarojas@gmail.com aŭ ilei.info/konferenco/)

**Oktobro 2008**

*2-5*: Tutlanda Oktobra Renkokntiĝo Pedagogia (TORPEDo-3) Herzberg, Gemanio. Novtipaj ekzamenoj laŭ la Referenckadro en Niveloj A-B-C, postularo, modeltestoj, trejnado de ekzamenantoj - estos unu el la ĉeftemoj. (ICH <esperanto-zentrum@web.de>)

**Julie (?) 2009**

94a UK en Bjalistoko, Pollando, ĉe la Teknika Universitato. Honore de la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.+

+UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando; uea@inter.nl.net; uea.org

Aktuala listo de E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe www.eventoj.hu/kalendar

# Pri Ekzamenoj

Congratulations to the four students in Don Houpe's beginning Esperanto class at the North Carolina School of Science & Mathematics who took the Basic (Komencgrada) Esperanto test last February and passed with distinction!

If you plan to take one of our three Esperanto examinations at the Esperanto convention in Montreal (some time between July 11 and 14), please notify the administrator, Dorothy Holland, at <dorothyjeanh@gmail.com> or 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521; phone 805-967-5241. You have a choice of the basic one (Komencgrada), intermediate (Mezgrada) or advanced (Supera). Syllabi listing what is covered in each exam are available from the administrator. Unfortunately, the time and date have not yet been set, but we hope they will be available for announcing in our June Bulteno. The fee is $10.

Also available at the Montreal convention in July are the international ILEI-UEA Esperanto tests, which are completely in Esperanto (including instructions) and include oral conversations with a trained administrator. They are on two levels (Elementa and Meza), each consists of 3 stages, and costs $40.20.

# Want to Correspond

- Lernantoj de Esperanto inter 15 kaj 19 jaroj, kiuj interesiĝas pri turismo, sportoj, vojaĝoj, komputiloj ktp, deziras korespondi kun esperantistoj el diversaj lokoj. Dankon flanke de ilia gvidanto Mramba Simba simbamramba@hotmil.com (Esperanto-Klaso, Salama Secondary School, P.O. Kesto 51, Bunda, Tanzanio)*
- Mi estas 28-jara instruistino, komencanatino. Interesoj: vojaĝoj, kulturoj, kutimoj, korespondado, Esperanto. Mi korespondas per paper-poŝto. Aĝo kaj sekso ne gravas! Pecs situas sudokcidente en Hungario. (s-ino Eva Hencz, Maleteer Pal u. 74. 3/10, 7632 Pecs, Hungario.*
- Mi estas 23 jara studentino, komencanto. Interesoj: legado, sportoj, muziko. (Zsuzsanna Somogyi, Debreceni 21, Nyirbator, Hungario) <zsizsi07@freemail.hu>*
- Mi estas irana 19 jara viro, komencanto. Mi serĉas geamikojn tutmonde (Mostafa Afsharpoor, Tabage 2 Gharbi, No. 36, Faz: 6, Shahrak Daneshgah, Jade Makhsuse Karaj, Tehran, Iran. <mostafaafsharpoorlinkinpark@yahoo.com>*
- Mia nomo estas Daniel, mi estas 28-jara meksikano. Mi esperantiĝis antaŭ 3 jaroj, kaj nun mi instruas esperanton en mia universitato. Mi estos metalurgia inĝeniero. Min interesas teruraj rakontoj kaj enigmoj. Krom serĉi saminteresulojn, nun mi serĉas samideanojn kiuj iros al la 7a TAKE en Montrealo. (s-ro Daniel Moreno Martinez, Nezahualcyyotl, Meksiko <Daniel.esperanto@hotmail.com>*
- Pli ol cent infanoj en la elementa lernejo Baiyangshu en la urbo Taiyuan, Ĉinio, lernas Esperanton por du lernohoroj ĉiusemajne kiel deviga lingvo ĝis la tria aŭ kvara lernojaro kiel gvida lingvo en la lernado de la angla, kiun ili eklernos en la tria klaso. La lernejo deziras kontaktiĝi kaj korespondi kun alilandaj elementaj lernejoj kun E-kurso. Wei Yubin, Balyangshujie-Xiaoxue, Taiyuan, Shanxi, CN-030003, Ĉinio. Rete: jado.wei@gmail.com. (El *Esperanto* majo 2008 p. 116)
- 15-jaraĝa lernanto, kristano. Mi amas paroli esperanton kaj mi havis la diplomon de la ekzameno A1. Mi amas ludi futbalon, serĉas korespondamikojn. Agbegnaglo Koffi Benjamin, Toglando. <akoffibenjamin@yahoo.fr> [De *Esperanto-USA* 2008/2]

*El *Komencanto* Jan.-Feb. 2008, paĝo 15

# Esperanto-klasoj en Usono kaj Kanado

At the North Carolina School of Mathematics and Science in **Chapel Hill, NC**, AATE member Don Houpe this year has taught two Esperanto classes (beginning and intermediate). Last February four of his six beginning students passed our basic (Komencgrada) Esperanto examination with distinction, and his four intermediate students will be taking the intermediate test (Mezgrada) at the end of May.

The other current Esperanto classes reported by our Education Secretary Beth Magallon in our January Bulletin are in **Upper Rawdon, NS, Canada** (Kim Keeble), **Northampton, MA** (Sally Lawton), **Jennings, MO** (Ron Glossop), **Harrisonburg VA** (Jeremy Aldrich), and **Elsah, IL** (Duncan Charters).

If YOU have been teaching Esperanto recently, please fill in the Course Report Form on the last page of this Bulletin and send it to Beth. Antaŭdankon!

## From and About Our Members

**Humphrey Tonkin** (West Hartford CT) estos unu el la juĝantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA ĉijare. Li ankaŭ helpis kunordigi la jarkunvenon de la Amerika Asocio por Antaŭenigo de la Scienco (AAAS), kiu okazis la 15-an de februaro en Bostono.

Alia membro de tiu organiza teamo estis **E. James Lieberman** (Potomac MD).

En mesaĝo pri artikolo pri lernando de lingvoj en *Parade* (4 majo), **d-ro Lieberman** (kiu estas pensiita klinika profesoro de psikiatro ĉe "School of Medicine" en la Universitato de George Washington) skribis jene:

"Esperanto qualifies as the easiest useful language (not 'major', referring to ethnic tongues). The Internet has been a boon for users of Esperanto, scattered among over 100 countries.

"Another point: With the current emphasis on brain exercise as preventive medicine (neurology, psychiatry) one sees 'learn a language'. That's easier said than done, except for Esperanto, a realistic choice for older adults. Logical rules increase repetition of grammatical forms and eliminate the burden of memorizing irregular conjugatIons and declensions. More at www.edukado.net or www.lernu.net"

Gratulon al **Hoss Firooznia** (Rochester NY), kiu estas la nova redaktoro de *Esperanto-USA*!

Gratulon ankaŭ al la Eduka Sekretario de AAIE, **Beth Magallon** (Tahlequah OK) kaj **Filipo Dorcas** (Fort Worth TX), prezidanto de Esperanto-USA, kiuj geedziĝos la 14-an de junio en Tahlequah!

Je tiu dato, AAIE-prezidanto **Ron Glossop** (Jennings MO) estos en Los Anĝeleso, Kalifornio, por reklami Esperanton ĉe tre granda kongreso de Rotario Internacia.
Aperis en Esperanto-USA (2008/2) kortuŝa tributo verkita de **Joel Brozovsky** (Spokane WA) pri **Don Harlow**, eminenta Usona Esperantisto ĵus forpasinta.

Ĉu vi rimarkis la artikolon en *Esperanto-USA* 2008/2 verkitan de **D Gary Grady** (Durham NC), la vic-prezidanto de AAIE kaj formatisto de nia Bulteno? ĝia titolo estas "Filling A Storehouse of Words".

En *Internacia Pedagogia Revuo* 08/1 estas du artikoloj verkitaj de AAIE-anoj:

1) "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" de **Enrique Ellemberg** (Fremont CA) — p. 30-31

2) "NASK 2007-2008 en Kalifornio" de **Ellen Eddy** (Olympia WA) — p. 31

## Announcements

Bedaŭrinde ni ne sukcesis havigi la datojn kaj horojn de la AAIE-jarkunsido kaj la ekzamenoj, ambaŭ kadre de la Esperanto-kongresoj en Montrealo en Julio. Espereble tiuj informoj pretos por inkluzivi en la junia Bulteno.

This is YOUR Bulletin! Please send to the editor*:

… Your ideas, questions, comments about teaching Esperanto;

….What Esperanto text-books, videos, teaching methods and/or techniques, etc. you find most useful;

….Requests for teaching advice

*S-ino Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521, Telefono: (805) 967-5241. E-poŝto: <dorothyjeanh@gmail.com>

**Ni pardonpetas la malfruegon de ĉi tiu *Bulteno*. Ni esperas pli akurate trakti la junian eldono. La limdato por kontribuoj al tiu estas la 15-a de junio.**

# American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR
Name Address ______________________________________________
Email address ______________________________________________

COURSE
Location ______________________________________________
Tuition cost ____________________________________________
Level: Elementary_____ Intermediate______ Other____________
Beginning and ending dates _____________________________
Number of lessons _______ Duration of each lesson ____________
Material used: Books_____________________________________________________________
Videos__________________________________________________________________
Other___________________________________________________________________

STUDENTS
Number finishing course ________ Age range_____________
Previous language skills __________________________________________________________
Is the course shown in the student records? ___________
Was an AATE exam administered? ___________

FORMATION OF CLASS
Name of organizer____________________________________________________________
Publicity method used_________________________________________________________
Supplier of course materials_____________________________________________________

COMMENTS OF INSTRUCTOR
Concerning publicity
__________________________________________________________________________
__________________________________________________________________________

Concerning materials
__________________________________________________________________________
__________________________________________________________________________

Concerning teaching
__________________________________________________________________________
__________________________________________________________________________

Please return this form to:
Beth Magallon, Eduka Sekretario
1103 Turpin Lane
Tahlequah OK 74464
Phone:
E-mail: <magallonb@tahlequah.K12.ok.us>

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME______________________________________ PHONE (___)_______________

ADDRESS______________________________________________________________

CITY. STATE_________________________________________ ZIP _______________

E-MAIL ADDRESS__________________________________

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___My e-mail address ___Other _______________

NAME & ADDRESS OF SCHOOL __________________________________________

__________________________________________

Are you a professional educator? ___Yes, active ___Yes, retired ____No

Annual dues are $40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are $20. Please indicate here: _______

Life Membership $800 _______ with subscriptions by mail $400 _______ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20___ ___New ___Renewal Today's date:__________

I wish to give $________ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027